

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



**Snejana
Kononova**

[N. OMKA, Ruslando]

printempo en Japanio

Kononova

2001

kiel Boris Kolker, Membro de la Akademio de Esperanto iĝis
esperantisto — literatur-historiaj paĝoj — religie — vera
okazaĵo dum la milito — aforismoj — denove pri proverboj
anekdotoj — anoncetoj — informoj --- korespondu!

3

Perantoj de KOMENCANTO

ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Esperanto-Asocio de Britio, 201 Felixstowe Road, Ipswich, IP3 9BJ

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

Estonio Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

Finnlando Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

~ R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

Germanio Dr. Wolfgang Sehwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio

Višnja Brankoviĉ, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Svedio SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

Venis printempo kaj nian kovrilon beligas la fantazio de *Snejana.Kononova* "Printempo en Japanio".

La gasto de la 3-a paĝo estas *Boris Kolker*, Membro de la Akademio de Esperanto, aŭtoro de kelkaj lernolibroj.

Ĉe la ĉefa temo vi povas konatiĝi kun *Kalman Kalocsay*, unu el la plej eminentaj figuroj en esperanta poezio. Kelkaj poeziaj verkoj sur niaj paĝoj prezentas nur guton el liaj poemoj, tial ni rekomendas al vi tralegi ĉiujn verkojn de *K. Kalocsay*.

Nia leganto el Svedio *Ralf Jalming* rakontas pri siaj impresoj de la vizito de rusa ortodoksa monaĥejo Valamo ĉe la lago Ladoga en Finnlando. Sampaĝe pri pasko kaj kelkaj sentencoj "El la Biblio", trad. de LL. Zamenhof.

Rakonto pri vera okazaĵo dum la dua mondmilito de Bill Thorne, aforismoj, proverboj kaj anekdotoj espereble altigos vian humoron. Tradiciaj adresoj kaj informo pri Pasporta Servo, kiun ni rekomendas al ĉiu vojaĝema esperantisto.

Agrablan legadon !

Dankon al s-ino *Van Bentum van den Brojek* el Nederlando pro la donaco de 150 guldenoj por KOMENCANTO !

KOMENCANTO

2001 numero 3 // 8 numeroj jare
regule aperas ekde 1997

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

retpoŝto : let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2001:

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo \$11;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA. vkud-a

ruslanda tarifo: 100 рублий (за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K"

La sola kondiĉo - nepre menci KOMENCANTO'n kaj la nomojn de la aŭtoroj kun ties loĝlokojn.

Kiel tio komenciĝis

Boris Kolker, Membro de la Akademio de Esperanto

Tiel fermiĝis la rondo

Karaj amikoj! Ni daŭrigas prezenti historiojn de eminentaj esperantistoj pri tio, kiel kaj kiam ili estis komencantoj. Hodiaŭ nia gasto estas Membro de la Akademio de Esperanto, aŭtoro de kelkaj lernolibroj Boris Kolker.



Komence de la jaro 1956 mi estis lernanto de la lasta klaso de mezlernejo en Kiŝinevo (Moldavio). Mi ŝatis viziti la ĉefan bibliotekon, kiu troviĝis apud nia hejmo, legante tie diversajn gazetojn. Tiam trafis min en ruslingva versio de la riĉe ilustrita gazeto "Pollando" artikolo de Isaj Dratwer (tiam prezidanto de Pola Esperanto-Asocio) sub la titolo "Pollando — patrujo de Esperanto".

La artikolo tre impresis min: ja mi komprenis, ke jen estas ŝlosilo al la vasta mondo el nia fermita lando.

Tamen mi supozis, ke tio estas io neatingebla por mi (kvazaŭ flugo al Marso) kaj ne serĉis pliajn informojn.

Somere de jaro 1957 en Moskvo okazis la 6-a Tutmonda festivalo de junularo kaj studentaro. Laŭ insisto de eksterlandaj esperantistoj tie okazis renkontiĝo de diverslandaj esperantistoj. Okaze de la festivalo do estis eldonita libreto pri Esperanto, kiu konsistis el gramatiketo kaj du vortaretoj. Mi ekvidis la libreton ĉe mia samfakultatano Mikaelo Benderskij kaj prunteprenis ĝin.

Mi prenis kajeron kaj skribis sur ĝi: "La 30-an de novembro 1957" — tio estas la dato, kiam mi komencis reskribi la libreton (kaj mi konsideras ĝin kiel la daton de mia esperantistiĝo).

Tiun laboron mi faris dum du semajnoj. Dum reskribado multo restis en mia kapo. Kaj mi plu studis per plej primitiva metodo: parkerigis la vortaretojn. Helpe de nova, sed tre aktiva esperantisto Eŭgeno Nikitin mi konatiĝis kun Ljubomir Sobanjskij, malnova esperantisto el Ukrainio. La lasta havigis al mi plurajn ekzemplerojn de la menciita libreto, ankaŭ lernolibron en la pola lingvo kaj internacian lernolibron "Petro". Krome, mi akiris de li gazetojn "Nuntempa Bulgario" kaj "Pollando" (eĉ kun la sama artikolo de Dratwer, sed en Esperanto!). Ĉion ĉi mi avide tralegis.

Mi aspiris al internacia korespondado. La ricevo de la unua letero feliĉigis min. Ĝi estis el Parizo. Bedaŭrinde, tiu studento estis ekservonta en armeo kaj malaperis. Inter miaj unuaj fidelaj korespondantoj estis Andrzej Malachowski kaj Zofia Mirska el Pollando (la lasta nun publikigas siajn novelojn), Nikola Ambov kaj Diana Jordanova el Bulgario; iliaj leteroj estis miaj lernotekstoj.

Laŭ instigo de la sama Mikaelo Benderskij (kiu, cetere, ne fariĝis esperantisto) en februaro de 1958 mi organizis mian unuan Esperanto-kurson, instruante per tiu pollingva lernolibreto. Kelkaj personoj finis la kurson, sed profitis el tio unuavice mi mem, ĉar mi devis prepariĝi al la lecionoj kaj klarigadi ĝis tiu grado, ke mi mem komprenadis neklaraĵojn.

Somere de 1958 mi kun aliaj studentoj veturis por tri monatoj al Kazaĥio por kolekti rikolton kaj laŭvoje instruis Esperanton al mia estonta edzino Esther. Ni geedziĝis post jaro kaj al nia filino ni ne nur

donis Esperantan nomon Bela, sed ankaŭ igis ŝin denaska esperantistino.

En januaro 1959 mi veturis al Odeso kaj tie konatiĝis kun juna kaj nova esperantisto Vladimir Samodaj. Ni havis kelkajn longajn konversaciojn en Esperanto kaj estis tre ĝojaj, ke la parolo fluas tute facile. Ni restis amikoj, kunlaborantoj kaj kunbatalantoj por la tuta vivo.

Mia unua Esperanto-tendaro estis BET-2 en Estonio en 1960. Tie mi faris kvar prelegojn pri interlingvistiko, de kio komenciĝis tendaraj universitatoj. Post tio mi (ofte kun la edzino kaj filino) partoprenis multajn Esperanto-tendarojn. En 1963, kadre de la unua sovetia grupo, mi partoprenis la 48-an Universalan Kongreson de Esperanto en Sofio, kie mi prelegis en la Kongresa Universitato pri maŝina tradukado el la rusa en Esperanton.

Ĉe la fino denove iom pri Isaj Dratwer. Poste li elmigris en Israelon kaj estis prezidanto de Esperanto-Ligo de Israelo. Mi iom korespondis kun li. Post lia morto lia loĝejo apartenas al tiu Ligo, kiu lugiĝas ĝin al mia kuzo Danielo Kolker (iam konata Esperanto-aktivulo en Zaporozĥe; cetere, li komencis lerni Esperanton unu monaton pli frue ol mi kaj instigis min esperantistiĝi). Somere de jaro 2000 mi partoprenis la 85-an Universalan Kongreson en Tel-Avivo kaj gvidis tie seminariojn pri la Kongresa temo. Dum mia dusemajna restado en Israelo mi loĝis ĉe mia kuzo Danielo en la iama hejmo de ... Isaj Dratwer. Tiel fermiĝis la rondo.

Cleveland (Ohio), Usono

Verkistoj de la 2-a periodo de esperanta literaturo

Kalomano Kalocsay



Kalman Kalocsay, kuracisto, doktoro de sciencoj, universitata profesoro, esperantisto de 1911, akademiano de 1949, ĉefredaktoro de "Literatura Mondo" estas sendube unu el la plej grandaj figuroj de la esperanta mondo. En la jaroj post la unua mondmilito li vigle partoprenis la movadon, kelktempe li estis eĉ sekretario de HES. Waringhien skribas pri li: "Alta, facilgesta viro, kun moviĝemaj manoj kaj tre karakteriza kapo, alta nuda frunto, kaj ĉio substrekitita de la ironia, iom diabla ridostreĉo de la lipoj; li parolas per velura voĉo...."

Lia loko estas senpere apud Zamenhof kaj Grabowski, kaj Kabe. Eble neniu kiel li sekvis la Zamenhofan postulon: surpreni malfacilajn traduktaskojn "ĉar nur tiamaniere la lingvo ellaboriĝos". Li observis ankaŭ la duan duonon de tiu ĉi konsilo: la ellaboron de la lingvo. La tasko de la tradukisto ne estas simpligi la tradukitajn verkojn, sed levi per la traduko la lingvan nivelon pli alten.

Apud Grabowski lin starigas lia poezia verkaro: kiel Grabowski fariĝis "la patro de la esperanta poezio" per sia traduko de "Sinjoro Tadeo" de Mickiewicz, tiel Kalocsay ne timis surpreni la interpreton

de poemoj de plej diversaj specoj kaj etosoj. Kaj li trovis en Esperanto la adekvatan tonon por la naiva epopeo "Johano la Brava" de Petefi, por la densaj tercinoj de la "Infero" de Dante, por la amaraj floroj de Baudelaire, por la facila sentimentalismo aŭ sprito de Haine, por tiom multaj poetoj de la ampleksa Hungara Antologio. Sian libron de tradukitaj poemoj el multaj lingvoj li dediĉis al Grabowski kaj jam antaŭe, en 1921, li prifunebris ties morton en bela elegio.

Liaj originalaj poemoj aperis unue en la kajereto "Mondo kaj Koro" (1921) poste en la volumo "Streĉita Kordo" (1931). En tiuj kolektoj Kalocsay montris sin kiel majstro de l' interna kaj ekstera formo.

Same, kiel li al Grabowski, la juna "skota skolo" omaĝis al Kalocsay en 1952 en sia komuna poemlibro "Kvaropo". En ties antaŭparolo G. Waringhien skribas: "Internaciajn lingvoprojektojn oni elpensis antaŭ Zamenhof (kaj ankaŭ post li, ho ve), sed nur Zamenhof sukcesis enblovi en sian la krea vivospiron. Verŝajne oni skribis antaŭ Kalocsay, sed nur li sukcesis vesti siajn verkojn per la aŭtenta nobleco de la senmorta arto". Kaj naŭ poemojn la "Kvaropo" dediĉas al la honoro de Kalocsay. Kio Grabowski estis por Kalocsay, tio estas Kalocsay al la nunaj poetoj: instigo, kuraĝilo, modelo, kiun tamen, oni devas superi — dirus Kalocsay mem.

... Kiam aperis poemlibro de Kalocsay "Streĉita Kordo", Lajos Tarkoni skribis en la entuziasmo: "Tie kaj tie ĉi kelkaj homoj ankoraŭ impresmaj de la voĉo de l' belo subite ekatentis — okazis io nova: poemlibro, kiu meritas ke oni lernu Esperanton nur por povi ĝin legi, poemlibro, kiu donacis al ni kristale evoluintan poezian lingvon: poemlibro, kies apero malfermas novajn

horizontojn por nia literaturo. ... La apero de la "Streĉita Kordo" estos unu el la plej gravaj datoj de nia estonta literaturhistorio".

Kio estas la gvidaj temoj de la "Streĉita Kordo"? Nenio eksterordinara. La esperantismo kun ties interna ideo, la postmilita deprimiteco, "vizaĝoj kaj pejzaĝoj", tenero kaj kompatado, ama amaro kaj dolĉo, vivo kaj morto. En la unuaj poemoj la poeto videble strebis je virtuozecon per rimriĉo, internaj ritmoj, aliteracioj. Poste li pli kaj pli demetas tiujn eksterajn ornamojn: la forma perfekteco jam montriĝas en la simpla senpereco de la penseldiro kaj sentkomunikado. Sed kian vivecon ricevas per tio la poemoj. Estas menciinde, ke Kalocsay transprenis plurajn poemojn el sia unua poemkajereto "Mondo kaj koro", sed plejparte tralaboris ilin. Multaj riproĉis lin pro tio: al ili jam estis familiara la poemo en la malnova formo kaj nun ili ne povis amikiĝi kun la nova. Kalocsay respondis: "Mi sentis en la ŝanĝitaj lokoj ian rigidecon, ian nematurecon, artefaritecon de lingvo: ili ne havis la sonoron de vivanta lingvo". Nun, releginte kaj komparinte tiujn lokojn, novajn kaj malnovajn, ni povas konfirmi, ke la oreloj de Kalocsay aŭdis bone.

En fina parto de la libro Kalocsay kelkloke tute forĵetas la rimojn kaj la ritmon kaj parolas en potencaj ondantaj liberaj versoj (en la poemo "Homo" kaj en la ciklo "Ebria ekvatoro"). Jes, li sentis la lingvon jam matura por ke ĝi prezentu poeziojn sen tiuj dekoraj, simple per la noveco, kaj drasteco de la esprimoj, per la koncizo de la parolturnoj.

Malgraŭ sia alttona poezio, Kalocsay povis esti ankaŭ delikata humuristo. En la "Rimportretoj" (1931) li omaĝis al la esperantistoj de sia generacio jen laŭdante, jen iom pinĉante...

Julio Baghy, homo homa,
 Homecon serĉas malespere
 Kaj luktas arde kaj kolere
 Kun la Milito sango-voma.
 En nokto de Malam' fantoma
 La koron portas li fajrere.
 Julio Baghy, Homo homa
 Homecon serĉas malespere.
 Pri ĉio misa, falsa, gnoma
 Indignas li profet-severe,
 Sed ofte ridas ni sincere,
 Se ĉarmas nin per ŝerc' aroma
 Julio Baghy, homo homa.

La "Arto poetika", estas poetika traktato en kiu li instruas detale pri temelekto, poeziaj ornamoj kaj pri la ebloj de la evoluo de la poezia lingvo...

Jam al la tria periodo apartenas lia "Ezopa Saĝo" (1956) en kiu Kalocsay verse reverkis kaj brile rejunigis malnovajn fablojn.

Specialan terenon ĉe Kalocsay okupas amoro kaj delikata senĝena erotiko. En 1932 aperis "Sekretaj Sonetoj" sub pseŭdonimo *Peter Peneter* kaj en 1969 ties dua eldono en la volumo "Libro de Amo" kies novajn seriojn verkis parte la "filo" sub ps.nomo: *Georgo Peterido Peneter*. La sonetoj konsistas el 52 perfektaj sonetoj pri evoluigantaj amoraj sentoj kaj amludoj de juna paro kun akurata sprita difino de la uzataj intimaj vortoj, neologismoj.

Lia originala prozo estas ĉefe lingvistika kaj poetika: "Lingvo Stilo Formo" (1931), eseoj pri lingvaj demandoj.

Sed per la poezia agado ne estas elĉerpita la esperantista aktiveco de Kalocsay. Li estis redaktoro (parte kun Ju. Baghy, parte sola) de "Literatura Mondo" dum ties ĉiuj tri periodoj, kun intermitoj, de 1922 ĝis 1948. Li sukcesis fari la revuon pli kaj pli altnivela kaj stile modela.

Dum lia redaktorado edukiĝis tuta generacio de bonaj stilistoj, lernantaj el liaj lingvaj konsiloj. La tri periodoj de "Literatura Mondo" enhavas veran trezaron de literaturo originala kaj tradukita, proza kaj poezia; oni vere devas ĝin ekspluati registrante liajn lingvajn akiraĵojn.

La poezia aktivado de Kalocsay jam tiutempe donis impulson

al multaj talentoj ekverki poezie. El iliaj poemoj Kalocsay mem faris du antologietojn: "Dek du poetoj" (1934) kaj "Naŭ poetoj" (1938).

G. Karczag skribis: "... Lia merito estas nemezurebla. Li faris ne nur gigantan laboron, sed ankaŭ tutan skolon, ĉiu nova poeto estas eĉ senkonscie sur lia influo, kaj ĉi tiu influo estas ne nur neologisma, sed montriĝas precipe en la pliiginta esprimovo de la lingvo. Tion konstatos foje la literaturhistorio de Esperanto, en kiu lia agado esats epokfara."

Li verkis kune kun Waringhien veran "monumenton" de gramatiko, la "Plenan Gramatikon de Esperanto" (1935), volumon sur 488 dense presitaj paĝoj. (R.Schwartz ŝerce nomis ĝin "kilogramatiko"). Oni povas diri, ke tio, kion oni nomas la "spirito de la lingvo", tie estis kaptita en regulojn de facile konsultebla libro".

W. Auld emfazas, ke Kalocsay, kiel majstro de formo "inter 1921 kaj 1939 kvazaŭ mem elaboris la tutan tradician poetikon de Esperanto." "Kalocsay impresis kaj impresas. La disciplino de grandioza intelekto, efikante sur emocioj persone kaj sincere sentataj, en kiuj ĉiu vorto ludas sian precizan rolon, kiel marmorero en rava mozaiko."

Festoj

Kiel en griz' de tagoj jaraj
 venas agrablaj ŝanĝoj:
 ruĝaj literoj kalendaraj
 de l' festoj kaj dimanĉoj,

tiel dum monotone pasas
 horoj en taga drivo,
 ravon de ŝanĝ', al ni donacas
 prodige nia vivo,

ĉar kara, se vi min brakumas,
 jen, dronas zorgoj teraj:
 en nia griza tago lumas
 minutoj ruĝliteraj.

Mil mil virinoj

Mil mil virinoj estis... Kie ili?


Jam dronis tute, tute.

Jen nur vin solan mi jam vidas brili,
 vin solan, absolute.

Virinajn buŝojn kun la ĝust matura
 de sekvinber-aromo,
 virginajn buŝojn kun acerbo pura
 de cidonia pomo,

jen ĉiujn gustojn, ĉiujn buŝojn multajn
 entenas viaj lipoj,
 de ĉie pelas al vi distumultajn
 dezirojn kaŝas vipoj,

kaj kiel sovaĝbestoj, kiujn bridas
 magia dresistino,
 jen ili, katenitaj, milde sidas
 ĉe via dolĉa sino.



Nina Vinnikova
 [NOVOALTAJSK, Ruslando]

**Ralf
Jalming,**
[GÖTEBORG,
Svedio]

LA NOVA VALAMA

Karaj amikoj. En 2001 okazis tre rara evento, — koincidis pasko katolika, protestana kaj pravoslava.

Ni petis niajn legantojn respuguli tiun eventon per desegnaĵoj kaj vi povas ĝui grafikaĵojn, kiuj ilustras paskon en Ruslando.

Pasko en Ruslando estas ŝatata kaj eble eĉ ne nur religia, sed ankaŭ printempa festo. Laŭ la ruslanda tradicio al pasko oni nepre kolorigas ovojn kaj kuiras "kuliĉi" - specialan paskan panon.

Ĉi sube vi povas ĝui rakonton pli fama Vira Valama Monahejo, kiu situas sur Valaama insularo en nord-okcidenta parto de la lago Ladoga.

La Monahejo sur la insulo Valaam estis fondita proksimume en la 14-a jarcento de Novgoroda Respubliko, poste tiuj teritorioj de Finnlando apartenis al Rusia Imperio

Pri siaj impresoj pri la Monahejo rakontas Ralf Jalming el Goteborgo, Svedio, kiu kelkfoje vizitis la monahejon. Li traktas tiun sanktan lokon kiel tereno por ripozo de animo.

turistoj, kiuj venas la tutan jaron, speciale somere. Ili gastas en Valamo dum unu aŭ pluraj tagoj.



La nova Valamo, kiu situas en orienta Finnlando inter la urboj Juensuu kaj Varkaus estis fondita en 1940. Post la finna-rusa vintra milito 1939-40 la monaĥoj en la malnova Valamo estis evakuitaj al Finnlando.

Valama monaĥejo havas tre longan historion. Dum multaj jarcentoj ĝi estis grava centro de rusa ortodoksio sur insulo de Ladoga lago. Ĉirkaŭ 150 monaĥoj estis transloĝintaj al Finnlando kie ili sukcesis akiri la grandan bienon Pappeniemi kaj tie komenci novan vivon. Tio ne estis facila, ĉar la plej multaj monaĥoj estis relative maljunaj kaj ili devis labori en la agrikulturo kaj flegi la bestojn, kiuj apartenis al la bieno. Sed iom post iom ili restarigis la religian vivon kiel ĝi estis antaŭe sur la insulo en Ladoga, kvankam en multe pli malgranda formo kaj dum aliaj cirkonstancoj. La lasta rusa monaĥo mortis en 1981.

Nuntempe estas nur kelkaj finnaj monaĥoj, kiuj loĝas tie kaj ili ne plu okupiĝas pri agrikulturo, sed sole pri flegado de la religia vivo. La enspezoj de la monaĥejo venas plejparte de la multaj gastoj kaj

Snejana Kononova
[N. OMKA, Ruslando]

MONAHEJO

La monahejo havas hotelon, restoracion, bibliotekon, popolan lernejon, kie oni povas studi diversajn kursojn pri ortodoksio, ikonpentrado ktp. Oni havas ankaŭ grandan vendejon por libroj, ikonoj kaj suveniroj. Oni vendas ankaŭ propre faritan dolĉan vinon, faritan el beroj, kiuj kreskas sur apudaj kampoj. En 1977 oni konstruis novan belan preĝejon kie oni havas diservojn plurfoje dum la tago. La preĝejo entenas multajn grandajn ikonojn, savitajn de la malnova Valamo.

Speciale dum la pasko venas multaj homoj por travivi la ortodoksan paskon kun ties multaj ceremonioj. La gastoj povas ĝui la trankvilon kaj atmosferon, kiu regas tie. Por nuntempaj homoj, kiuj kutime vivas en tre bruaj kaj streĉaj cirkonstancoj, la vivo en la monahejo estas tre ripoza. Oni povas partopreni la diservojn, viziti la bibliotekon, promeni en la bela naturo aŭ okupiĝi pri propraj aferoj. Proksime de la monahejo troviĝas tombejo, kie ripozas multaj rusaj monaĥoj, kiuj iam venis el la tuta Ruslando kaj trovis la lastan ripozon en finna arbaro. Ankaŭ la konata finna poeto Pentti Saarikoski havas sian tombon tie.



pentris sur la paĝo **Nina Vinnikova**
[NOVOALTAJSK, Ruslando]



Tradukis D-ro **L.L.Zamenhof**

El la Biblio

Elektitaj ĉapitroj

Kelkaj Sentencoj de Salomono

Ne sekvu malbonajn homojn kaj ne deziru esti kun ili.

Per saĝo konstruiĝas domo kaj per prudento ĝi fortikiĝas.

Ne opiniu vin saĝa, timu Dion kaj deturnu vin de malbono.

Ne pripensu malbonon kontraŭ via proksimulo, kiam li kun konfido loĝas ĉe vi.

Homo saĝa havas forton, kaj homo prudenta estas potenca.

Kiam falas la malamiko, ne ĝoju, kaj ĉe la malfeliĉo via koro ne plezuriĝu.

Kiu respondas ĝustajn vortojn, tiu kisas per la lipoj.

Bill Thorne

[LONDONO, Britio]

Joe Blore

an

Fine ĉiuj estis kontentaj

Dum la milito, je Kristnasko, la germana armeo lanĉis atakon. Sur la franca mapo, la rekta linio kiu dividis la armeojn subite kurbiĝis. Haste ni sendis pli da soldatoj por kontraŭi tion, kaj la batalo nomiĝis "la Batalo de la svelo" (de la linio).

Ni estis medika trupo, kaj tie ni uzis difektatan konstruaĵon kiel provizoran malsanulejon, kaj unu mejlon fore, farmbienon por manĝi kaj dormi. Malgraŭ, ke ni estis nur medikuloj, oni donis al ni la elekton, aŭ porti malgrandan pafilon, 4,5 milimetran pistolon, aŭ ne. Ni trovis, ke iuj, kiuj elektis porti ilin, devis deĵori kiel gardostaranto.

Joe Blore estis malgranda, pava kaporalo, kun nigraj, penetrantaj okuloj. Li elektis porti ne unu, sed du pistolojn, kiel vakero. Li trovis infanan biciklon kaj uzis ĝin por la vojaĝo inter la farmbieno kaj la laborejo. Unu tagon sur la vojo, li preterpasis rompitan domon, kaj aŭdis germanajn voĉojn ene. Anstataŭ pedalante furiozi hejmen, li haltis, metis biciklon al la barilo, tenis siajn du pistolojn kaj eniris la domon. En la unua ĉambro du germanaj soldatoj genue disrabis la ŝrankon. Silente Joe atendis. Fine unu germanulo sentis lian ĉeeston. Li turnis sin, vidis Joe'on kun du pistoloj celitaj al lia postaĵo. Li puŝetis lian kamaradon, kaj diris "Ho, mein Gotte".

Joe starigis ilin en la koridoro. Supre aliaj voĉoj indikis ke aliuloj disrabis la ĉambrojn, kie ili trovis virinajn ĉapelojn, ktp. Unu post la alia la germanuloj vidis iliajn kamaradojn sube minacatajn per freneza brita nano kun du pafiloj kaj estis prudente kapitulacii. Finfine, Joe havis naŭ kaptitojn kaj li marŝigis ilin al la farmo, kune kun unu, kiu ŝovis lian biciklon.


Tie li prezentis la grupon al la kolonelo, kiu ne estis kontenta. "Mankas al ni la facilecon en la aĉa farmo por teni kaptitojn, stultulo," - li plendis.

"Ĉu mi rajtas pafigi ilin?" - demandis Joe. Li ege ŝatus uzi liajn pafilojn.

La germanuloj paliĝis. Ili bone komprenis.

"Ne, tute ne.", - diris la kolonelo. "Atendu, atendu". Li sciis, ke kamionoj de la regimento iris tien kaj reen, do metis la naŭ germanajn soldatojn sur unu, kaj pere sendis ilin al kampo por militkaptitoj.

Fine, ĉiuj estis kontentaj. Neniu mortis. Por la germanaj soldatoj la milito estis finita; ili restis en brita malliberejo, kiu estis ege pli humana ol tiuj germanaj. La kolonelo ricevis medalon. Joe Blore menciigis la depeŝon kun honoro. Kaj por la Reĝa Armea Medika Korpuso preni kaptitulojn...



Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco
{N.Neksin}

AFORISMOJ

Tro da tostoj je la
sano de aliuloj difektas la
vian

Boris Kolker

Aforismoj el la ekzercoj
"Lernolibro de la lingvo
Esperanto. Baza kurso"
[MOSKVO, "Nauka", 1992]

Prefere malĝoja fino ol
malĝojo sen fino

*

Prefere ellerni facilan
lingvon bone, ol malfacilan
malbone

*

Saĝulo ŝatas lerni,
malsaĝulo - instrui.

*

Unue kontrolu - poste
parolu.

*

Kio min ne interesas -
tion ni tuj forgesas.

*

Ni interesiĝas pri
homoj, kiam ili interesiĝas pri
ni.

*

Por esti bona instruisto,
necesas ami tion, kion vi
instruas, kaj tiujn, kiujn vi
instruas

{V.Klučevskij}


*

Vivu kun homoj tiel, ke
viaj amikoj ne estiĝu
malamikoj, sed ke malamikoj
estiĝu amikoj

{Pitagoro}

*

Vi tre helpas al mi, se vi
ne malhelpas al mi.



Margarita Zueva

[MOSKVO, Ruslando]

Tiu kiu volas faras pli ol
tiu, kiu povas

{G.Murej}

*

Legado por spirito estas
la samo, kiel la gimnastiko por
korpo.

{D.Addison}

*

Multaj homoj estas
similaj al kolbasoj: per kio oni
ilin farĉas, tion ili portas en si.

{Kozjma Prutkov}

Valerij Makarenko

[TVERJ, Ruslando]

Saĝeco estas pensado ne
pri morto, sed pri vivo.

{Spinozo}

*

Juneco estas tempo por
akumuli saĝecon, oldeco estas
tempo por eluzi ĝin.

{J.J. Russo}

*

Menso esta kapablo vidi
la kunecon de komuna kaj
aparta.

{Kanto}

Kolektis kaj esperantigis

Hussein Amili

[LONDONO, Anglio]

Kiamaniere vi "elspezas"
vian tempon pli gravas, ol kiel
vi elspezas vian monon.
Financajn erarojn oni povas
korekti, sed la tempo foriras
por ĉiam.

*

Je la okuloj de infano
estas ne sep mirindaĵoj de la
mondo, sed sep milionoj da ili

*

Morto, impostoj, akuŝo.
Neniam estas oportuna tempo
por iu el ili.

*

Satiro tradicie estas
armilo de senpotencaj kontraŭ
la potenculoj.

*

Tenu viajn timojn al vi
mem, tamen disdonu vian
kuraĝon.

*

Sukceso kovras multajn
fuŝojn.

William Thorne el
LONDONO, Britio,
ellaboris vortaron,
kiu titoliĝas:

“RIMARO Helpilo
por verkisto de poemoj
aŭ kantoj”. (vidu “K-2-’99”)

Ĉar ni jam konstatis, ke proverbo estas
verso, do, RIMARO de *Bill Thorne* tute
taŭgas kiel helpilo por kompili proverbojn
kaj rimigi viajn saĝajn pensojn.

Ni planas ĉiunumere sinsekve
publikigi po-parto la RIMARON, ĉar ĝi
estas vere utila afero por komencantoj.

En la sekva numero vin atendas
vortofinoj je AGO, AĜO, ABO kaj tiel plu
ĝis UO (avenuo-genuo-statuo...) Bonvolu
aldoni viajn vortojn kaj sendi al ni por
kompletigi la vortaron.



ADO

agado
balado
balustrado
barikado
blokado
brigado
ĉokolado
estrado
farado
fasado
grado
grenado
invado
kamarado
kavalkado
kanonado
lado
limonado
marmelado
mikado
pado
plado
rado
serenado
spado
ŝarado
trado

Taŭgas ŝarado por mensa trejnado!

Proverbo venas el popola cerbo.

Kio estas proverbo, kiel ĝi diferencas, ekzemple, de aforismo? Aforismo havas personan aŭtoron. Ĉiu proverbo, sendube, havis iam sian aŭtoron, sed ties nomo perdiĝis post la vicego da jaroj. Aforismo estas saĝa eldiro aŭ komento en prozo. Proverbo preskaŭ ĉiam estas verso. Verso en unu linio.

Ni daŭrigas temon de proverboj kaj prezentas al vi novajn “maldekstrajn partojn...” de la proverboj, al kiuj vi provu al-pensi la finojn, t.e. kompletigi la proverbojn.

Ni ne publikigas dume la venintajn respondojn al la proverb-enigmoj en “K-2”, ĉar malproksimas Aŭstralio kaj Brazilo, Usono kaj Japanio de nia Uralo kaj ne pasis sufiĉe da tempo por ĉies respondoj.

Tamen ni ripetas nian peton aktive partopreni ekzercojn pri proverboj.

Finverku la proverbojn

Amiko fidela estas trezoro ...
Aspekto impona - sukceso ...
Eĉ unu minuto gravas por ...
Ĉielo lazura estas ...
Fremda okulo en ĉiu ...
Li estas ulo - nuloble ...
Ne preteros serpento taŭgan ...
Por besto sovaĝa bezonatas la ...
Pro agrabla penso ne laĉiĝas ...
Taŭgas fabelo por ...

Yonier Cables Solis [HOLGVIN, Kubo]

Aperas prudento kiam pasas la momento.

Babilas, muelas, kion lango elpelas


Celo kaj vero estas bona afero

Ĉe botisto la ŝuo ĉiam estas kun truo

Danĝera estas bovo antaŭe, ĉevalo -
malantaŭe, kaj malsaĝulo de ĉiuj flankoj

Valerij Makarenko [TVERJ, Ruslando]

“... mi proponas anonci konkurson por la nova titola emblemo de
KOMENCANTO kaj proponas unu mian version”





El familia vivo

— Mi hieraŭ estis kun la edzino en teatro, kaj jen apud mi sidiĝas simpatia junulino...

— Vi bonŝancis, ĉar povas okazi tute male.

*

La patrino forestis dum du semajnoj. Reveninte hejmen ŝi demandas sian filon:

— Ĉu la patro estis malĝoja dum mia foresto?

— Dekomence ne, sed dum lastaj du tagoj li iĝis pli kaj pli malgaja.

*

— Infanoj, kiu el vi povas doni vivan ekzemplon de sammomentaj koincidoj?

— Mi! Ĉe mia patro kaj mia patrino la geedziĝo okazis en la sama dato!

*

— Kion vi povas diri pri via nova frato, kiun donacis al vi viaj gepatroj?

— Mi povas diri, ke ekzistas multaj pli bezonataj objektoj.

*

— Vovoĉka, kiel vi ne kompatas vian patrinon? Rigardu - ĉiu via huliganaĵo aldonas ankoraŭ unu arĝentan haron sur mian kapon! Vovoĉka skeptike rigardas la patrinon.

— Al mi ŝajnas, ke vi estis multe pli huligana en la infaneco, ol mi. Rigardu, kiom da arĝentaj haroj estas ĉe la avino!

*

La avino kantas al la nepo lulkanton. Unu horon kantas, la alian, la trian... Laciĝis kaj decidis ripozi. La nepeto malfermas la akulojn kaj demandas:

— Avinjo, ĉu mi rajtas ekdormi?

Esperantigis **Olga Smirnova**
[GUBKIN, Ruslando]

— Permesu...

— Permesu al vi ne permesi!

— Mi ne permesas al mi ne permesi!

*

— Mi neniel povas ĉesi fumi! Jam ĉiujn rimedojn mi provis...

— Sinjoro, ĉu vi provis bombonojn?

— Provis, ili ne fumiĝas.

*

— Mortas maljuna abelisto. Ĉirkaŭ li kolektiĝis la tuta familio, parencoj.

La abelisto:

— La vivo estas bagatelo, sed la abeloj...

La parenco:

— Nu kiel, do, kial vi tiel diras?

— Tamen, se bone pensi, la abeloj ankaŭ estas bagatelo.

*

Kurso por dezirantoj skii per montaj skioj konsistas el tri partoj:

1. Lerni surpiedigi la skiojn

2. Lerni gliti per la skioj de sur la montopinto

3. Lerni paŝi per lambastonoj

*

Telefonsonoro je la tria horo nokte:

— Hola! Ĉu ankaŭ vi ne dormas?

Esperantigis **Aleksandro Nazarov**
[KOSIHA, Ruslando]


Mortis advokato kaj testamentis tutan sian havaĵon al stultuloj kaj frenezuloj.

“De ili mi ĉion ricevis kaj al ili redonas”.

*

— Mi ne komprenas, kiel vi povis dum nur unu tago fari tiom da stultajtoj?

— Mi tre frue vekigiĝas...



Aleksandro Ŝulepov [VERHOTURJE, Ruslando]

Anoncetoj Informoj Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.


UEA-membroj
vi povas diskuti pri ĉiuj aspektoj de la agado de UEA ĉe la reta tutjara kunveno @egroups.com
Aliĝo: reto@uea.org
menciu vian nomon kaj uea-kodon

Tatjana Zavjalova
36 ja., sinjorino deziras korespondi tutmonde Bone posedas la anglan.
P.k. 265
ARKHANGELSK
163009
Ruslando

Valerij Makarenko
33 ja., deziras korespondi tutmonde
Bobkova, 28/3 — 6
TVERJ
170024
Ruslando

Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) serĉas kontaktojn. Skribu al :
Jozefo Nemeth
Fo u. 41/5, H-8531 Ihasz,
Hungario
nlat@konyvtar.c3.hu

s-ro Silvio Cavalc
profesoro, instruisto de E-to kursoj, pri adresoj por korespondi por siaj kursanoj
Caixa Postal, 938,
BR-12201-970
Sao Jose dos Campos - SP
Brazilo



s-ro Max Finkenzeller
korespondi pri globalismo
Trostr. 27/10/2
AT - 1100
WIEN
Aŭstrio

s-ino Isaula Gabriela
33 ja. tradukistino dez. kor. tutmonde pri religio, turismo, hajku-poemoj, vivmanieroj
OP 13, CP 26,
Bukuresto
Rumanio

Annice Szrajzman
mi serĉas opiniojn pri la instruado de lingvoj kaj aliaj fakoj de E-to
37 Graham Road
Mitcham,
CR4 2HB,
Britio

Corine Charton
komencantino, deziras korespondi kun brazilanoj
Villa Esperanto
Route de Rians
FR-13490
Francio

PASPORTA SERVO

Pasporta Servo celas faciligi internaciajn kontaktojn, donante al la uzantoj la eblon gasti ĉe esperantistoj. Ĉiujare aperas la Listo de gastigantoj. Esperantistoj, kiuj membras en PS rajtas senpage tranokti ĉe la gastigantoj.

Por uzi Pasportan Servon sufiĉas aĉeti la libron (10,8 eŭroj + afranko kaj imposto 6%). Vendas UEA, landaj libroservoj kaj asocioj. Gastigantoj ricevas ĝin senpage.

Dezirantoj iĝi gastiganto kaj uzi PS skribu al:

Pasporta servo, **Derk Ederveen**, Weestenburgerstraat 15,
NL-2275 XR Voorburg, Nederlando.

pasporta.servo@esperanto.nu

TTT-paĝo: <http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

La unua Adresaro aperis en 1974 kun 40 gastigantoj. Listo de 2001 nombras 1161 gastigantojn en 80 landoj!
Inter ili: **Francio - 103; Germanio - 94; Ruslando - 87; Britio - 52; Usono - 49; Brazilo - 46; Japanio - 41 kaj multaj aliaj landoj.**

Alessandro Fr. Soares
29 ja. fraŭlo, muzikisto, dez. kor. kun virinoj (20-35 jaraj) pri muziko, libroj kaj filmoj.
Caixa Postal 05242,
Taguatinga 72.001-970,
Brasilia-DF
Brazilo

Stanislav P. Stojkov
bulgara esp-isto dez. kor. tm, inteŝanĝi bildkartojn
ul. Drujba, 5-B-13
Gorna Orjahovica,
BG-5100
Bulgario

s-ro Vjaĉeslav Vasiljev
komencanta instruanto de E-to serĉas esp-istojn-filate-listojn por interŝanĝi pm.
Osipenko 10-2
Lugansk
UA-91005
Ukrainio

Viaj donacoj por KOMENCANTO estas ĉiam bonvenaj. Dankon!

